B Föreningsbrev

Novaj tekstoj kaj anoncoj por *inter-LIGILO* N-ro 1:98 estu ĉe la redaktantoj marde, la 27--an de januaro. La laborgrupo renkontiĝos la saman daton je la h.19.

÷ ÷ ÷

Ĉiumarde loka kunveno en nia klubejo je h.19.oo– 21.00. / **Varje tidag sammanträde** i vår lokal kl.19– 21.00

÷ ÷ ÷

La estraro de Esperanto-Societo de Gotenburgo

Christer Lörnemark, prez.	031 – 41 26 53
Andreas Nordström, sekr	– 52 59 72
Anders Mellbratt, kasisto	– 29 52 78
Fredrik Olofsson, vicprez.	– 19 84 49
Ralf Jalming, vicsekr.	– 51 09 55
Gertrud Brestan, anst.	– 46 91 76
Karl-Erik Peterson, anst. + turismaj aferoj	– 82 06 39
Gustav Larsson, bibliotekisto	– 53 72 29
Bo Sandelin, revizoro	– 91 85 54
Dolly Carlsson, revizoro	– 38 16 23
Sven Kärrefors, vicrevizoro	– 28 07 94

Membrogazeto de la Esperanto-Societo de Gotenburgo,

inter-LIGILO.

Ne-membroj povas aboni ĝin kontraŭ 40 kronoj. Skribu sur la poŝtgira talono: "Por la inter-LIGILO".

Responda eldonanto: Aira Kankkunen, tf.n/ fakso: 031-18 79 82
<aira.kankkunen@swipnet.se>

Redaktantoj: Aira Kankkunen, Christer Lörnemark, Andreas Nordström, Fredrik Olofsson

Esperanto-Centro de Gotenburgo
Masthuggsliden 1, **Se – 413 18 Göteborg**
Tfn 031-12 05 94 Poŝtgira konto : 43612–1
Rete: al Christer Lörnemark: <chlo0006@student.gu.se>

N-ro 5:97

inter-LIGILO

Esperanto

Tago de La Libro

16.12.-97

19.00 - 21oo

en Esperanto-Centro
Masthuggsliden 1

Novaĵoj pri Esperanta literaturo

Rakontos docento Ebbe Vilborg

Bonvenon!

Karaj Gelegantoj

Jen la plej lasta *inter-LIGILO* ĉi-jare. Rapide kuras la jaroj, ĉiuj jaroj. Ne antaŭ longe ĝi estis nova prezentita kiel bebo kun buklaj hararoj - kaj nun - nun li, apogante sin al la bastono treniĝas antaŭen al la terminalstacio de la finkonservado portante en sia dorsosako sinajn spertojn, ne ĉiam feliĉajn. Tamen - neniam mi vidis la bildon, kiu estus prezentinta La Jarmaljunulon, kun kolera vizaĝo; kontraŭe, spite de malfacilaĵoj okazintaj dum la jaro, li humile klinas sian kapon. Kial? - La jaro mem ja estas nur tempoperiodo, kiun ni uzis kaj uzas diversmaniere.

Sed - antaŭ ol ĉiu el ni faros sian propran registradon de la baldaŭ forironta jaro, ni havos kristnaskon. Ni kutimas doni donacojn al niaj geamikoj. Troviĝas multaj, kiuj havas neniun amikon, infanoj, kiuj ne havas ĉiutagan panon. Eble ni povus iom plibonigi nian jarfinan bilancon donante al ili el nia superfluo - ĉu ne?

Aira

Kära Läsare

Här årets sista *inter-LIGILO*!

Med en hastig fart springer åren. Det var inte länge sedan när ett nytt åt presenterades som ett litet barn med lockig hår och nu redan - stödjande på sin käpp kånkar han mot slutbevaringsstationen bärande i sin ryggsäck sina erfarenheter, inte alltid så lyckliga. Ändå - jag har aldrig sett en bild av "Den Gamla", vars ansikte hade avspeglat vrede; tvärtom., trots sina svåra erfarenheter, böjer han sitt huvud ödmjukt. Varför? Året är ju i sig själv estas endast en tidsperiod, som vi använde och använder på olika sett, var och en på sitt sätt..

Men - innan ni gör vår eget bokföringsslut om det gångna året, har vi julen. Vi brukar ge presenter till våra vänner och släktingar. Det finns många, som inte har några vänner, barn, som inte har sitt dagliga bröd. Kanske kunde vi ge till dem något från vårt överflöd, förbättra vår balansräkning vid årets slut - eller hur?

Aira

Tove Janson



marde 20. januaro 1998
h. 19 - 21
Andreas Nordström
prelegos pri ŝiaj verkoj kaj vivo
en Esperanto-Centro
Masthuggsliden 1

BONVENON!

UK en Gotenburgo?

Ekzistas planoj por eventuale organizi Universalan Kongreson en Gotenburgo dum unu el la unuaj jaroj de la dua jarmilo. La ideon estigis Göteborg & Co. - entrepreno posedata de la Gotenburga komunumo kun la celo surmerkatigi la urbon turisme kaj kongrese - kiu sendis proponon al UEA en Roterdamo. La 11-an de novembro dekunu Esperantistoj, reprezentantaj la Svedan kaj Gotenburgan E-Movadon, estis ofertataj ĉirkaŭiradon en la ejo de Svenska Mässan kaj renkontiĝon kun reprezentantaoj de Göteborg & Co.

Substrekendas ke nenio estas ankoraŭ decidita, ĉar la afero devas esti zorge diskutata en la kluboj de la regiono, kaj kun SEF. La problemo estas: trovi sufiĉe da volontuloj por organizi la kongreson. Se ni esperantistoj en Gotenburgo trovos ke ni kapablas la personaran flankon ankaŭ restas decido flanke de SEF prezenti Gotenburgon kiel kandidatan urbon al UEA. Kaj restos por vidi kiun lokon UEA selektos por la priparolata jaro; 2003 estas proponata jaro.

Estas kompreneble malfacile antaŭdiri kiom da partoprenantoj havus mondkongreso; 2000-3000 povas esti verŝajna cifero, konsiderante antaŭajn kongresojn en Eŭropo. Oni ja ne bezonus mencii kian anraŭenpuŝon la Esperanto-Movado povus ekhavi en la regiono, kaj en la lando kiel tuteco, kun granda evento kiel ĉi tiu.

Sed unue ni diskutu la aferon.

Christer Lörnemark

★

En världskongress i Göteborg?

Det finns planer på att eventuellt hålla en esperantistisk världskongress (Universala Kongreso) i Göteborg under de första åren av 2000-talet. Idén väcktes av Göteborg & Co. - ett kommunalt bolag med uppgift att marknadsföra staden - som sänt en förfrågan till UEA i Rotterdam. Den 11 november bjöds elva esperantister, repre presenterande de svenska och göteborska esperantorörelsen, på en rundvisning i Svenska Mässans lokaler, och ett möte hölls med Göteborg & Co.

Det ska understykas att inget beslut ännu är fattat, eftersom saken måste diskuteras igenom grundligt i regionens klubbar, och med SEF. Problemet är att finna tillräckligt många frivilliga till att organisera kongressen. Om vi esperantister i Göteborg finner att vi kan klara det personella återstår också för SEF att besluta om att presentera Göteborg för UEA som kandidatstad. Därefter återstår att se vilken ort UEA väljer för det aktuella året; 2003 har nämnts som förslag.

Det är förstås svårt att sia om hur många deltagare en världskongress skulle få; 2000-3000 verkar vara en rimlig siffra, med tanke på tidigare kongresser i Europa. Det behöver väl knappast sägas vilken skjuts framåt esperantorörelsen skulle kunna få i regionen, och resten av landet, med ett stort evenemang som detta.

Men först måste frågan diskuteras.
Christer Lörnemark

☆ ☆ ☆

Två arrangemang

Det första arrangemanget var 28 oktober, då den lilla publik som vågat sig till lokalen fick lyssna på onsdagsgruppens elever när de läste upp sina litterära verk. Aira lyckades sporra sina elever till att skapa små mästerverk i prosa och poesi. Årets tema var vintern och bidragen upplästes till ackompanjemang av Ralf Lundstens musik ur "En vintersaga". Verkligen synd att de flesta missade programmet, för det var uppskattat av de få som kom!

Till det andra arrangemanget 18 november var uppslutningen lite bättre. Det utgjordes av fortsättningen på Britta Rehms filmvisning av sin jordenruntresa 1972. För att undvika vidare missöden med filmprojektorn hade Britta nu låtit överföra filmerna till video och både videoapparat och TV fungerade oklanderligt. Efter att ha repriserat filmen från Sydostasien, som vi lyckades se redan förra gången (innan projektorn lade av), gick nu färden vidare till Australien, Fidji, Hawaii, San Francisco och till sist New York, allt till Brittas initierade och underhållande kommentarer. Publiken berömde henne för hennes goda handlag med kameran. Filmerna togs ju 1972, så det var också roligt att se hur klädmodet ändrats sedan dess, ja, faktiskt t.o.m. så att cirkeln slutits – 70-talsmodet har ju kommit i ropet nu igen!
Andreas

☆

Du aranĝoj

La unua aranĝo okazis 28 oktobro kiam la malgranda aŭskultantaro sin kuraĝinta en la klubejon povis aŭskulti la lernantojn de la merkreda grupo kiam ili laŭtlegis siajn literaturajn verkojn. Aira sukcesas instigi siajn lernantojn al kreado de malgrandaj majstroverkoj en prozo kaj poezio. La temo de la jaro estis "La vintro" kaj la kontribuaĵoj lautlegiĝis akompanataj de muziko de Ralf Lundsten, "En vintersaga" [Vintrorakonto]. Vere domaĝe ke la plej multaj maltrafis la programon, ĉar ĝi estis ŝatata de la malmultaj kiuj venis!

La dua aranĝo 18 novembro kolektis iom pli da partoprenantoj. Ĝi konsistis el daŭrigo de la filmmontrado de Britta Rehm pri ŝia monda rondvojaĝo en 1972. Por eviti pluajn akcidentojn je la filmprojekciilo Britta estis transiginta la filmojn en videoformaton; kaj la videoaparato kaj la televidilo funkciis senprobleme. Post remontro de la filmo pri sudorienta Azio, kiun ni sukcesis spekti jam la antaŭan fojon (antaŭ ol la projekciilo paneis), la vojaĝo daŭriĝis en Aŭstralion, la Fidji-insulojn, Havajon, San-Franciskon kaj fine Novjorkon, ĉio akompanata de la iniciitaj kaj distrigaj komentoj de Britta. La spektantoj laŭdis ŝin pro ŝia bona uzado de la kamero. La filmoj ja fariĝis en 1972, kaj ankaŭ estis amuze vidi kiom la vestmodo ŝanĝiĝis ekde tiam, jes fakte eĉ tiel ke "la cirklo estas rondirita" – la modo de la 70-aj jaroj ja refuroras nuntempe!
Tradukita de Christer

☆ ☆ ☆

ATENDU! ATENDU!

Jen ĉi-kune poŝta pagformularo por la venontjara membrokotizo.

Rimarku, ke familianoj povas membriĝi per ege malmultekosta membrokotizo kaj por Sveda Esperanto-Federacio kaj por nia loka klubo. Diskutu kun viaj familianoj pri tio kaj uzu ĉi tiun malavaran oferton, per kiu vi subtenos E-agadojn.

☆

VIKTIGT! VIKTIGT!

Här får Du inbetalningskortet för nästa års medlemsavgift.
Observera att familjemedlemmar kan bli medlemmar mot en liten avgift både för Svenska Esperantoförbundet och för vår egen klubb. Diskutera med dina familjemedlemmar om detta och använd detta generösa erbjudande, med vilket Du stödjer esperantoverksamheten.

☆

KOTIZOJ DE UEA POR 1998
(por svedoj)

Individua Membro-Abonanto, jarlibro + la revuo *Esperanto* **400:-**
Individua Membro kun jarlibro + la revuo Kontakto (≤ 29-jaraj) **160:-**

Por pagado kontaktu Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, **242 94 Hörby**. Tfn: 0415-501 52.

☆

Lämna inte till i morgon det som Du kan göra i dag, ty morgondagen har sina bekymmer.



★★★

Esperantokursoj dum la jaro 1998

Nybörjarkurs börjar januari – februari. Den exakta tiden meddelas senare.
Anmälan till Christer Lörnemark, tfn: 031 – 41 26 53

★

Daŭrigaj kursoj/ Fortsättnings kurser:
Kursstart: 12 januari, lunde / måndagar 18.00–19.30 en / i E-Centro,
Lärare / instruisto: Inga Johanson tfn: o31 – 15 57 23

★

Kursstart: 15 januari, ĵaŭde / torsdagar 18.30–20.00 en / i E-Centro, Lärare / instruisto: Christer Lörnemark tfn 03 1 – 41 26 53

★

Konversacia rondo, Merkreda Grupo renkontiĝos 11 februaro , merkrede je la 11.00 h.. E-Centro.

★

För nybörjar- och fortsättningskurser i Kungälv vänd er till Märtha Andréasson, tfn 57 11 33, för information.
Por komencantaj kaj daŭrigaj kursoj en Kungälv turnu vin al Märtha Andréasson, tfn 57 11 33, por informoj.

★★★



Dankon

al ĉiuj el vi, kiuj donis monon por nia inter-LIGILO

★★★

Aperis nova libreto de

Aira Kankkunen

Ĉu via bebo aŭdas?
Frua serĉado de aŭdodifektoj ĉe infanoj
Kompendio por infanprizorgocentroj

"Por Gelegantoj
La fonto de ĉi tiu esperanta kompendio estas la sveda manlibro por infanprizorgocentroj. Ĝi efektiviĝis post multjara intensiva kunlaboro inter Aŭdologia sekcio de Sahlgren malsanulejo kaj Infansanŝirma centro de Göteborg. Ĝi estis publikigita en la jaro 1986 kun la nomo: 'Hör Ditt barn?' de Aŭdologia sekcio de Sahlgren malsanulejo kaj Infansanŝirma centro en Göteborg.
Aira Kankkunen"

Oni povas mendi la libreton ĉe UEA Libroservo kaj ĉe la verkistino per 35 Skr + sendokostoj.
La adreson vi trovos sur la lasta paĝo de *inter-LIGILO.*

★★★

Esperanta radioelsendoj en la Interreto

De la 20-a de oktbro 1997 Pola Radio ĉiutage elsenda 4-minutan programeron en E-o per la Interreto. Ĉi tiu nova iniciato ebligas la aŭskultadon de tiu E-informservo en la tuta mondo je kioma ajn horo tage aŭ nokte.

De la reagoj de niaj ret-aŭskultantoj dependos, ĉu de la 1-a de januaro 1998 komenciĝos aŭ ne komenciĝos plena duonhora radio-elsendo de Pola Radio en E-o pere de la reto.

Do, Pola Radio petas, ke oni sendu al la adreso: <petty@radio.com.pl> respondojn al la demandoj:

– Kion vi pensas pri la signifo de la nova iniciato de Pola Radio por la globskala informado?

– Kion vi pensas pri la longeco de ĉi tiu nuna 4-minuta programero de Pola Radio en E-o? Kion vi opinias pri eventuale plilongigo? Se jes, kia.aspecajn programerojn vi deziru aŭskulti en tiu plilongigota programero aŭ radioelsendo en E-o?

– Kion pri Polio vi deziru ekscii per la E-elsendoj de Pola Radio?

– Kion vi opinias pri la nuna stato de la informado pri Polio en via lando? Ĉu ĝi estas kontentiga aŭ ne ? Kian rolon en tia informado povus ludi pli plivastigitaj E-elsendoj de Pola Radio en la reto?

La respendojn al la menciitaj demandojn povas influi eventualalan decidon pri la plilongigo de la ret-elsensendoj.
Bonan ret-aŭdeblecon deziras al vi
Andrzej Pettyn,
estro de la E-Redakcio de Pola Radio

Rim: *La adreso de la reta 4-minuta radioelsendo en E-o estas jena:*
<http://www.wrn.org/stations/poland.html>

– La aŭskulta programo RealAudio estas senpage elŝutebla de la retpaĝo:
<http//www.real.com/ >
El "Eventoj" 2/ oktobro – '97

★

Grandegajn Gratulojn

al Pola Radio

kaj

al La Ŝatataj Geredaktoroj

de E-elsendoj,

kiuj bonege informas e-istojn pri E-okazaĵoj en la tuta mondo kaj ankaŭ pri polaj novaĵoj politikaj kaj pri aliaj aktualaĵoj kaj... ne malpli multe pri pola kulturvivo.

Ni esperas, ke vi havu eblecon plilongigi la sendotempon de viaj mondskalaj radioelsendoj per la Interreto kaj tiamaniere pli bone ol nun disvastigi informojn pri Esperantujo kaj pri Pollando.

Estas ege bone, ke la reto-elsendojn oni povas aŭskulti je kioma ajn horo; tiu faciligas tutmondan aŭskultadon, krome oni povas elekti la tempon, kiam la aŭskultado estas malpli multekosta.

Pere de nia *inter-LIGILO*
salutas vin
Esperanto-Societo de Gotenburgo

★★★